

BONVENON,

BONVENON,

KARAJ GEAMIKOJ!

BONVENON,

BONVENON,

KARAJ GEAMIKOJ!

Ĉu Vi aŭdis tiun kanton?

Aŭskultu ĝin en: <http://ileiweb.extra.hu/portonovo.html>

Afrikaj samideanoj eĉ kantante invitas Vin al

La 41-a Konferenco de ILEI en Portonovo (Benino)

29 de julio – 05 de aŭgusto 2008

Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero

ILEI-Konferenco en Afriko — Kial?

ĈAR:

- En ajna aranĝo ni vidas malmultajn samideanojn el Afriko, do, venis tempo por pensi pri alternativo kaj ILEI akceptis defion — ni konferencos en Afriko, en Benino, en Portonovo tuj post UK.
- ILEI konferenco en Afriko en la jaro 2008 estas grava evento kaj por Esperanto-movado entute kaj por historio de ILEI kaj por E-movado en Afriko.
- Por omaĝi kaj kuraĝigi lokajn samideanojn, doni instigon al pliaj paŝoj kaj helpi disvastigi nian lingvon en la tuta mondo.
- Indas ne nur ĉeesti gravan eventon, sed ankaŭ interŝanĝi spertojn kun niaj afrikaj samideanoj, kontribui al disvastiĝo de nia lingvo en la tuta mondo kaj ĉerpi inspiron el ilia entuziasmo.
- Por konatigi lokajn aŭtoritatojn kaj intelektulojn kun esperanto-medio kaj ebligi daŭran kunlaboro de esperantistoj kaj neesperantistoj ankaŭ en Afriko.

Loka Konferenca Komitato (LKK):



ALOFA Jérôme Charles — prezidanto de LKK,
financaj aferoj



HOUSOUNOU François — raporto



GBADAMASSI Latifou — invitletoj,
korespondado



ESSOU Sébasien — ĉeforganizanto, ekskursoj

Konferenca temo:

Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero

Inspiro por la ĉi-jara konferenca temo de ILEI venis de la deklaroj de UN kaj Unesko per kiuj la jaro 2008 estis proklamita Internacia Jaro de la Planedo Tero, kun la celoj kiujn resume esprimas la slogano Fari la Teron pli bona loko por la homspecio – tersciencistoj por la socio.

En tiu kunteksto nia konferenca temo analizeblas laŭ la jenaj du aspektoj:

- Laboro de la instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero: kiel ili kontribuas kaj ankoraŭ povas kontribui al la celaro de la Internacia Jaro de la Planedo Tero ĉi-jare kaj en pli longa perspektivo?
- Formado de instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero kiel gardenda vivloko de la homa specio.

La pedagogio de Esperanto povas diri multon pri tio. La projekto Esperanto-instruistoj por Afriko, kiu realiĝas en pluraj Afrikaj landoj kunlabore kun ILEI, Afrika komisiono kaj Afrika oficejo de UEA, serĉas kaj proponas la praktikajn respondojn laŭ la Afrikaj cirkonstancoj kaj bezonoj. Ĝiaj rezultoj kaj konkludoj estos specifa kontribuo al la konferenca temo. Pli vasta traktado sekvos la

jenajn subtemojn:

- La pedagogio de Esperanto en la teorio kaj praktiko
- Aplikado de la pedagogiaj valoroj de Esperanto al konsciigo pri la problemoj kaj bezonoj de terprotektado kaj socia evoluo
- Alirebleco kaj disvastigado de la tersciencaj scioj per Esperanto
- Formado de instruistoj de Esperanto

Konferenca urbo:

La nomo Portonovo certe sonas kutima por esperantistoj, kvankam ĝi originis de portugala lingvo kiam Eucharistus de Campos el Portugalio rimarkis dum lia esplorvojaĝo en 1730, ke la tiama urbo ege similis al la urbo Porto de Portugalio. La nomo tiel restis eĉ dum kaj post la franca influo. Tamen multdiverskulturaj enloĝantoj de Portonovo ne ofte uzas la portugalan devenvorton, sed „Hogbonu“ kaj „Aĝaĉe“ laŭ respektive la lingvoj la gona kaj la joruba. Portonovo estas oficiale la ĉefurbo de Benino. Ĝi gastigas la parlamenton kaj kelkajn aliajn ŝtataadministrejojn. Ĝi tamen ne estas la plej granda urbo en Benino, sed situas je ĉirkaŭ tridekoj kilometrojn de Cotonou, la plej granda kaj ekonomie grava urbo de Benino. En Cotonou estas ankaŭ la flughaveno kiu estas facile atingebla de la konferencurbo. Portonovo estas ankaŭ transirurbo al la giganta Niĝerio. Estas preskaŭ neeble ne rimarki la ekziston de la praktiko de voduo, kiam oni promenas en la urbo de Portonovo. Voduo estas religio por iuj, sed tradicia vivmaniero por aliaj.

Geografio: Portonovo estas havena urbo borde de la laguno de Portonovo, kiu estas flanko parto de la Golfo de Gvineo. Fine de 2005 la urbo havis 234.168 enloĝantojn: Portonovo, do, estas la dua plej granda urbo de Benino, sed estas ekonomie malpli signifa ol la urbo de la registara sidejo, Cotonou. La geografiaj koordinatoj estas 6° 29' 0" norde kaj 2° 37' 0" oriente.

Historio: Ĝis la 17-a jarcento la urbo nomiĝis Ajatche kaj estis la ĉefurbo de la reĝlando Aja. Sian nunan nomon (en Esperanto „haveno nova“) ĝi ricevis dum la 17-a jarcento de portugala maristoj, kiuj sklavigis afrikanojn kaj de ĉi tie ŝipe sendigis ilin al Norda Ameriko. Dum la jaro 1863 la reĝlando akceptis la „protektion“ de la franca armeo, por bari la antaŭeniron de la brita armeo. La najbara reĝlando Dahomey tamen malaprezis la sekvan ĉeeston de francaj soldatoj en Aja, kaj komenciĝis milito inter la du regnoj. Dum la jaro 1883 la franca mararmeo okupis Portonovon kaj la urbo iĝis parto de la franca kolonio Dahomey. Dum 1900 la urbo iĝis la ĉefurbo de Dahomey, la hodiaŭa Benino.

Ekonomio: La urbo estas la centro de agrikultura regiono, kies ĉefaj produktoj estas palmoleo kaj koton, kaj kiu krome eksportas kapokon.

Kulturo kaj eduko: La École du Patrimoine Africain, instituto pri la konservo de la kultura heredaĵo de Afriko, aktivas en 26 landoj de la kontinento sude de la Saharo, en kiuj la ĉefa lingvo estas la franca, hispana kaj portugala.

Konferenca programo:

Konsiderante, ke tiu ĉi internacia aranĝo estos grava evento por afrikanoj, la konferenca programo devos esti vere bunta kaj abunda. Por la konferenca programo oni antaŭvidas tradiciajn programerojn: inaŭguron, ekzamenojn de ILEI/UEA (en elementa kaj meza niveloj), interkonan, nacian kaj internacian vesperojn, solenan fermon. Laŭeble okazos ankaŭ programeroj, kiuj jam iĝas

tradiciaj: unutaga Simpozio laŭ konferenca temo — konatigo de lokaj aŭtoritatoj kaj intelektuloj kun la E-medio kaj ebligado de daŭra kunlaboro de esperantistoj kaj neesperantistoj; Lingva Festivalo (prezento de lingvoj kaj kulturoj fare de partoprenantoj de la konferenco el diversaj landoj) — laŭeble publika, kiel donaco de esperantistoj por lokaj loĝantoj kaj unu el la formoj de kunlaboro kaj konatiĝo kun la loka medio, ankaŭ kiel efika varbilo por nia lingvo; Bankedo — komuna vespermanĝo en lukseca etoso eĉ kun afrika vino; vesperaj aranĝoj kun kultura programo en agrabla etoso.

Pli preciza programo estos dissendita al aliĝintoj en Dua Informilo.

Ĉefa celo de la konferenco estas kontribuo de ILEI al la progreso de Esperanto en Afriko, transdono kaj interŝanĝo de instruspertoj, sed ne malpli gravas ankaŭ profiti interkulturan renkontiĝon inter Afriko kaj aliaj kontinentoj, spertiĝi pri afrika Esperanto-movado, per Esperanto ekhavi kulturajn konojn pri la landoj de la partoprenantoj, enrigardi la ĉiutagan vivon, starigi verajn interhomajn personajn kontaktojn, kiuj kresku al multjara kunlaboro ene de nia movado kaj ekster ĝi.

Pro ĉio ĉi ni ĉiuj devos streĉi niajn fortojn kaj klopodi organizi kelkajn seminariojn, specialajn kaj lingvajn kursojn, ankaŭ organizi seriojn de prelegoj — siaspecan Konferencan Universitaton de ILEI.

Instruista trejnado en Afriko estas prioritata tasko por ILEI. Grava paŝo de tiu agado estis la trejnseminario en 2007 samloke, kie okazos la konferenco. Fotojn kaj filmitan materialon pri ĝi Vi povas vidi sur retpaĝo de ILEI. Ankaŭ per tio ILEI subtenis la klerigadon de afrikaj gekolegoj, kiuj havas malmultajn eblecojn partopreni internaciajn renkontiĝojn, rekte kontaktiĝi kun gekolegoj, interŝanĝi spertojn pri metodiko, didaktiko de Esperanto-instruado.

En sia 41-a konferenco ILEI proprakoste financos partoprenon de 20 afrikaj samideanoj por ilia pluklerigado. **Financa helpo por subvencii partoprenon de kiom eble pli da instruistoj kaj instrukapbligadon de junaj instruemuloj el Afriko bonvenos al la konto ilek-a de ILEI ĉe UEA, aŭ al Afrika Fondaĵo de UEA, ĉiam kun indiko “Benino 2008”.**

Pli detale pri la Simpozio:

La unuan fojon konferenca simpozio kunlabore kun loka universitata medio okazis en la jaro 2005 en Kaunas dum la 38-a ILEI-konferenco. La konferencon kaj simpozion apogis Kaunas Humanisma Fakultato de Vilnius Universitato. Kompreneble, ĝi estis nur eksperimento. Sed, laŭdire, tre sukcesa. Neesperantistaj universitatoj jam kelkfoje demandis, kiam denove ili povos partopreni esperantistan konferencon. Por ni — esperantistaj instruistoj — tre gravas, ke ni havu eblecon interŝanĝi ideojn ankaŭ kun ekstermovadaj pedagogoj. Plej grava atingo estas subskribitaj interuniversitataj kontraktoj. Tiamaniere, pere de Esperanto kreiĝis profesiaj kontaktoj kun nemovadaj kolegoj.

Pro tio la simpozio okazis ankaŭ en la jaro 2006 en Parma dum la 39-a ILEI-konferenco. Denove ĝi estis tre sukcesa — lokaj organizantoj sukcesis allogi ankaŭ atenton de lokaj gravuloj, urba municipo, komunumo.

La 40-a ILEI-konferenco okazis en alia mondoparto, en Japanio, en urbo Ranzan en 2007. Ankaŭ tie okazis unutaga simpozio laŭ konferenca temo. Ĝin partoprenis kelkaj gastoj, venintaj speciale por la Simpozio kaj salutparoladon faris vicdirektorino de la konferencejo Ŝtata Eduk-Centro por Virinoj. Ĉijare ni konferencas en Afriko kaj denove planas okazigi Simpozion. Ni tute ne konas pedagogian kaj sciencajn medion de Afriko. Tamen ni esperas je fruktodona kunlaboro. Indas kontroli.

Esperantistoj estas tre amikema, tolerema kaj kreiva „popolo“. Ebleco komuniki kun loka medio ĉiam estas trajto de esperantistaj aranĝoj. Pro tio aperis la ideo elprovi la simpozion ankaŭ en tiu medio. Ĉu ni sukcesos? Ni kredas, ke jes, sed Vi ĉiuj estas bonvenaj ĉeesti kaj testi (dezirinde poste vaste kaj publike klaĉi) kaj nepre serĉi personajn kontaktojn por daŭra kunlaboro.

Oni povas prelegi en la lingvoj Esperanto kaj la franca (kun traduko al Esperanto). Se oni volas prelegi en aliaj lingvoj, oni devas mem prizorgi pri traduko al Esperanto. *Oni nepre havu resumon en Esperanto, sendepende de la lingvo en kiu oni prelegos!*

Por aliĝi al la Simpozio necesas plenigi aliĝilon kaj sendi noticon de la prelego al estrarano pri konferencoj Aida Ĉizikaitė .

La organiza komitato sendos al la aliĝintoj informojn pri la partopreno ĝis la 20-a de julio kaj la simpozian programon ĝis la 25-a de julio 2008. Se vi volas riĉigi per prelego la programon de la Simpozio aŭ havas konaton kiu dezirus aŭ povus tion fari, bonvolu turni vin al organizantoj.

Pli detale pri la Lingva Festivalo:

Kio estas la festivalo? La LF estas donaco de esperantistaj instruistoj kaj aliaj partoprenantoj de la ILEI-konferenco al urbanoj kaj tio estas iuspeca kunlaboro de ILEI kun urba komunumo. Tiamaniere ILEI volas danki lokajn gravulojn pro la apogo de la konferenco. Ĝuste pro tio LF estas anticipe anoncanta, senpaga, libere vizitebla aranĝo dediĉita al la lokanoj.

Lingvaj Festivaloj jam havas sufiĉe longan historion kaj vastan geografion. Tamen ĉiam tiu aranĝo estas vere ĝoja kaj ŝatata de partoprenantoj kaj spektantoj. Ĉiam estas interese vidi mondon per aliaj „okuloj“, t. e. alimaniere vortumita kaj esprimita.

Dum ILEI-konferencoj okazis jam kelkaj Lingvaj Festivaloj. Kompreneble, ĉiam malsamaj, depende de lokaj kondiĉoj. Tamen ĉefa trajto de la festivaloj — Esperanto havas specialan kaj tre honoran rolon: ĝi estas „ponto“ inter multaj „nekonataj“ lingvoj kaj la loka lingvo. Tre bone, se ni havas eblecon aranĝi Lingvan Festivalon kvazaŭ donacon de esperantistoj al loka publiko. Tiukaze la lokaj loĝantoj ne nur ĝuas buntecon de lingva mondo, sed ankaŭ vidas valoron de la Zamenhofa lingvo.

Ankaŭ dum la 41-a ILEI konferenco en Portonovo (Benino) okazos Festivalo de lingvoj kaj kulturoj. Laŭ programo ĝi estas antaŭvidata la 4an de aŭgusto (pro deziro sukcesi bone pretiĝi).

Kia estos la festivalo ĉijare? Dependas de Vi — venu, partprenu, ĝuu, spektu, inteŝanĝu spertojn, akiru sciojn pri fremdaj lingvoj, donacu peceton de via kulturo al aliaj kaj — tre gravas — montru veran utilon de Esperanto al neesperantistoj, eĉ se ili nur hazarde aperos en la festivalo.

Ĝuste pro tio Lingva Festivalo estos anticipe anoncanta, senpaga, libere vizitebla aranĝo dediĉita al lokanoj. La Lingva Festivalo okazos en konferencejo. La festivalon partoprenos unuflanke prezentantoj de diversaj lingvoj, aliflanke — spektantoj inter kiuj ni esperas vidi ne nur konferencanojn, sed ankaŭ lokajn loĝantojn, interesiĝantajn pri fremdaj landoj, lingvoj, kulturoj. La Lingva Festivalo similos al foiro de intereso, kie prezenti sian landon kaj sian lingvon, estos invitataj ĉiuj partoprenantoj de la 41-a ILEI-konferenco. Ĉiu prezentanto havos 25 minutojn por prezenti sian lingvon laŭ sia bontrovo.

Kutime Lingva Festivalo daŭras nur unu posttagmezon — tiom da tempo ni bezonas por prezenti lingvojn. Ĉi-jare dum la tuta konferenco okazos kelkaj seminarioj, lige al la Festivalo. Laŭeble ni vidos filmitan materialon kaj fotojn de la antaŭaj Lingvaj Festivaloj, kune lernos kaj pretigos materialon, kiujn ni demonstras la lastan posttagmezon de la konferenco.

Gvidantino de kelkaj Lingvaj Festivaloj dum ILEI konferencoj Vladka Chvatalova diris: „Ankaŭ en Benino ni ŝatus organizi etan internan Lingvan Festivalon por montri al ĉiuj partoprenantoj, kio ĝi estas, kaj ebligi uzi tiun ĉi programon en la estonta agado en diversaj landoj. La LF similas al foiro de intereso, kie ĉiuj partoprenantoj de la 41-a ILEI-konferenco estas invitataj prezenti sian landon kaj sian lingvon. Ĉiu prezentanto havos 25 minutojn ĉe speciale aranĝita stando kaj rajtos prezenti sian lingvon laŭ sia bontrovo. Eblas tute simple prezenti, paroli pri historio, gramatiko, geografia regiono aŭ ligita kulturo, aŭ veni vestita per naciaj vestaĵoj, kunporti naciajn manĝojn, aŭskultigi naciajn muzikon, naciajn dancojn k. t. p.“ Kutime estas prezentataj, depende de la tuta nombro, 4-5 lingvoj samtempe, kaj sekvas 3-4 paralelaj duonhoraj prezentadoj. Dum niaj

konferencoj ni uzas 25 minutojn por prezenti ĉiun lingvon, sed ankaŭ ekzistas festivaloj kun ekzemple 1-horaj prezentoj. Ebla strukturo de la prezento povas esti ekzemple (ne nepre!):

1. Historio de la lingvo — 3 min.
2. Nuna geografia regiono de uzado de la lingvo — 2min.
3. Prezento de ĉefaj gramatikaĵoj de la lingvo — 5min.
4. Ekzemploj de tipaj esprimoj, salutvortoj ktp. — 7 min.
5. Nacia kulturo, ligita kun la lingvo — 8 min.
6. Ekzemploj de sonanta lingvo — 5 min.

Principe ne ekzistas ununura maniero por tia prezento, iu preferas esti pli serioza, iu prezentas en sia duonhoro kvazaŭ komedion. Komence de la konferenco okazos kunveno, dum kiu ni ankoraŭ pli detale klarigos, kiel prepari prezentadon de lingvoj, do ne timu proponi vin mem!

En Portonovo ni fakte ne planas publikan prezenton, nur kvazaŭ "laborseminarion" pri preparado de lingvaj prezentoj kaj etan internan festivalon, por prezenti al afrikaj samideanoj kaj instrui al ili kiel poste utiligi tiun eblon dum aliaj eventoj.

Kie okazos la festivalo? La LF okazos en la konferencejo — Songhai Centro. Ĝi okazos la lastan postagmezon de la konferenco — la 4an de aŭgusto.

Kiel aliĝi al la festivalo? La LF estas organizota de ILEI, do en la elektronika aŭ papera aliĝilo bonvolu noti, kiun lingvon Vi emus prezenti kaj kiujn ilojn Vi bezonas. Al la LF ne necesas aliĝi, se Vi volas nur spekti ĝin.

Kiel kontakti organizantojn? Vi estas bonvena skribi al Vladka Chvatalova (sciuro@hotmail.com) aŭ Aida Ĉiĝikaitè (aidute@mail.lt)

Pri la ILEI/UEA-EKZAMENOJ:

Oni atentigas pri la rekomendo de la Estraro de UEA, ke la delegitoj „atingu almenaŭ la nivelon de meza ekzameno“. Simile, laŭ la regularo pri nova ILEI/UEA-ekzameno pri instrukapablo, „kandidatoj devas posedi Esperanton minimume ĝis la nivelo de la meza ekzameno de ILEI/UEA“. Estraro de ILEI aparte atentigas ĉiujn instruistojn, instruantojn kaj instruontojn, ankaŭ membrojn de ILEI, ke ili atingu almenaŭ ĝis la nivelo de la meza ekzameno de ILEI/UEA.

Se Vi faras ekzamenon de elementa nivelo dum UK, ni havas al Vi ankoraŭ unu proponon: tuj post ĝi venu al ILEI-konferenco por fari la meznivelan ekzamenon kaj ĝuu interŝanĝon de spertoj kun afrikaj samideanoj.

Se Vi ne kuraĝas fari elementan ekzamenon dum UK — venu por fari ĝin dum ILEI-konferenco. Kial? Ĉar apude, dum la tuta semajno, Vi havos diverslandajn instruistojn kaj instruantojn al kiuj ĉiam eblas direkti Viajn demandojn, ĉiam kun ili Vi povos konsultiĝi pri diversaj gramatikeroj kaj lingvouzo. Eĉ lerni tion, kion Vi ne sukcesis imagi kaj multe plibonigi sian lingvonivelon por nepre sukcesi dum la ekzameno.

Dum la konferenco en Portonovo okazos la Internaciaj Ekzamenoj pri Esperanto je elementa kaj meza niveloj. La ekzamenoj konsistas el tri partoj: gramatika testo, skriba parto kaj parola parto. Nur sukcesintoj en la gramatika testo rajtas partopreni la skriban parton de la ekzameno kaj, atinginte en tiu skriba parto la sukceslimon de 60 poentoj, la parolan parton. Pro praktikaj kialoj anticipa sinanonco estas konsilinda. Anoncu Vin prefere antaŭ la 15a de julio 2008 ĉe la prezidanto de ekzamena komisiono dum la konferenco en Portonovo Mireille Grosjean ĉefa loka organizanto (Mireille.Grosjean@rpn.ch), Charles Alofa (alofkarlo@yahoo.fr) aŭ estrarano pri konferencoj Aida Ĉiĝikaitè (aidute@mail.lt) kaj samtempe pagu la ekzamenkotizon (60 % de la MA-kotizo en la loĝlando de la kandidato) al UEA konto **ilek-a**. Kaze de neprezentiĝo aŭ ne sukceso en la testo, oni ricevos 50 % de la pagita kotizo. Eblos sin anonci ankaŭ dum registrado veninte al la konferenco. Tiam la ekzamenkotizo estos 70 % de la MA-kotizo en la loĝlando de la kandidato.

Detalaj informoj pri la ekzamenoj, inkluzive de specimenaĵoj, troviĝas ankaŭ ĉe www.edukado.net/ekzilei.jsp

POR LOGANTOJ DE B-LANDOJ LAŬ LA 36a PAĜO DE UEA-JARLIBRO DUM LA ĈI-JARA KONFERENCO LA EKZAMENIĜO ESTOS SENPAGA!

NE PERDU EBLECON KONVINKIĜI KIOM BONE VI UZAS LA LINGVON!

Pri la bankedo:

Bankedo okazos la 4an de aŭgusto je la 18:30 kaj estos fina oficiala programero de la konferenco. Ĝi okazos en loka restoracio anstataŭ la lasta konferenca vespermanĝo. Festena komuna vespermanĝo kun afrika vino kaj lokaj manĝaĵoj certe pasos en ĝoja kaj ŝika etoso en rondo de ĉarmaj samideanoj, kiujn kunligas la sama lingvo kaj ne disigas malsamaj kulturoj.

Kosto de la bankedo por A-landanoj 35 EUR, por B-landanoj 20 EUR. Afrikaj samideanoj estas petataj kontribui po 1 EUR nur al tiu ĉi ununura programero de la tuta konferenco.

Utilaj informoj:

Vetero en Portonovo:

Pluva sezono ekz. en julio-aŭgusto: mallongaj, ne tre fortaj pluvaj periodoj, milda pluvado, poste suno. Temperaturo en julio 22-27 C, vespere, nokte sufiĉe malvarme: ĉ.16 C

Do, bonvolu kunporti pluvombreton kaj maldikan kontraŭpluvan maltelon. Kompreneble, ne forgesu ankaŭ ĉapelon kaj okulvitrojn kontraŭ suno. Se Vi volas promeni nokte, kaptu ankaŭ puloveron.

Akvo:

Oni konsilas ne trinki akvon rekte de krano Bonvolu kunporti iun ilon, per kiu Vi povus boligi la akvon antaŭ ĝin trinki. Se Vi aĉetos akvon — nepre kontrolu, ĉu la botelo estas fermita en fabriko, aŭ de la vendanto mem. Konsilindas aĉeti nur tiun, kiu estas produktita en fabriko.

Manĝoj:

Ĉiuj manĝoj estas **inkluzivitaj**, mankos eblo por mem zorgi pri manĝado.

Sekureco:

Kompare kun grandaj urboj, Songhai Centro estas sekura loko.

Tamen esti singardema pri mono kaj havaĵoj estas kompreneble preferinde.

Valuto kaj monŝanĝo:

En Benino oni uzas lokan valuton *Communauté Francophone d'Afrique* — CFA. Estas nur unu monunujo. Ne eblas pagi per banko karto. Neniu banko troviĝas en la Centro.

Jam de kelkaj tagoj en la halo de flughaveno en Cotonou troviĝas **Ecobank**. Do eblas preni monon per banko karto (nur VISA kaj lokaj kartoj) el banko aŭtomato. Ankaŭ eblas ŝanĝi eurojn al CFA en flughaveno.

1 EUR egalas al ĉirkaŭ 650 FCA, tamen la kurzo povas ŝanĝiĝi.

Telefonado:

Eblas uzi publikan telefonan servon en la Centro. Uzeblas kaj karoj, kaj moneroj. La kartojn eblos aĉeti en la Centro. Telefonkodo de Benino estas 229, por Portonovo estas 20.

Poŝtaj tarifoj:

Bildkarto kostas 1 000 F CFA, estas aĉeteblaj en la Centro. Poŝtmarkoj aĉeteblas nur en poŝtoficejoj, tamen ĝi ne troviĝas en la Centro.

Kostoj de sendado de leteroj:

– enlande (Benino)

10 g 300cfa

20 g 350cfa

50g 500cfa

– al landlimaj landoj de Benino (Togolando, Niĝerio, Niĝerlando, Burkino):

10g 400cfa

20g 450cfa

50g 750cfa

– al Senegalio, Ganao, Eburio, Liberio, Malio, Maŭritanio, Gvineo k.t.p:

10g 400 cfa

20g 450 cfa

50g 1000 cfa

– al AZIO-AMERIKO-OCEANIO

10g 700 cfa

20g 900 cfa

50g 1500 cfa

– al EŬROPO

10g 500 cfa

20g 600 cfa

50g 1300 cfa

Por registrado eksterlanden oni aldonu 1500 cfa al la normala sendokosto.

Retaliro:

En Centro Songhai troviĝas komputila ĉambro kun retaliro. Ĉiu rajtas uzi ĝin laŭbezone, aparte pagante pohore. Unu horo kostas 500 CFA

Kopiado:

En la Centro estas ebleco fari kopiojn, sed 2 paĝoj kostas 1 EUR. Bonvolu prizorgi disdoneblan materialon antaŭ Via alveno, ĉar ILEI **ne pretas** pagi tiom grandan sumon pro kopiado surloke.

Sanservoj:

En Benino eksterlandanoj **vizitante kuraciston devas pagi tutan sumon** kaj reveninte hejmen iras kun kvitanco al asekurkompanio por ricevi monon. Bonvolu mem prizorgi sanasekurojn en Viaj landoj kaj kunporti ilin al Benino. En la Centro kuracisto ne troviĝas.

Medikamentoj:

Se vi uzas preskribitajn medikamentojn, bonvolu kunporti kuracistan recepton en la latina. Konsilindas ankaŭ havi recepton de la kuracisto, se Vi portas medikamentojn tra landlimoj.

Vakcinado:

Por ricevi vizon kaj eniri la landon oni nepre bezonas vakcinadon kontraŭ la flava febro; ĉiuj aliaj vakcinoj laŭvole. Rekomendindas piloloj kontraŭ malario.

Nepre havu iujn rimedojn kontraŭ insektoj, kiujn Vi povos uzi por Via haŭto, Viaj vestaĵoj kaj por meti ĉe fenestro, ankaŭ ĉe lito.

Vizoj:

Ĉiuj partoprenantoj de la konferenco nepre bezonas vizojn.

Necesas havi 2 fotojn, montri la vakcin-libreton (nur kontraŭ flava febro estas bezonata), menditajn flugbiletojn al kaj el Benino, invitilo (taŭgas ankaŭ fakse), 4 plenigitajn formojn por peti la vizon (havaeblas en ambasadejoj kaj konsulejoj) kaj pasporto valida 6 monatojn pli longe ol planata reveno el Benino

AMBASADEJOJ DE RESPUBLIKO BENINO:

- **GERMANIO** (por Aŭstrio, Danlando, Finlando, Norvegio, Svislando kaj l'ONUDI) Rüdigerstrasse 10 Post-Sech, 228-5300 Bonn, Tel.: (49 228) 34 40 31
- **BELGIO** 5, Avenue de l'Observatoire 1180 Bruxelles Tel.: (32 2) 35 94 71
- **KANADO** 58, avenue Glebe Ottawa (Ontario) K1S 2C3 Tel: (613) 233 4429 Fax:(613) 233 8952
- **Ebura Bordo** (por Senegalo, Sieraleono, la Gvineo kaj Liberio) 09 BP 283 Cocody, Abidjan Tel.: (225) 22 41 44 13/14 Fax: (225) 22 41 27 89
- **USONO** 2737 Cathedral Avenue - Washington DC Tel.: (1 202) 232 66 56 Fax: (1 202) 239 65 00
- **Gabono** Tel.: (241) 73 76 82
- **GANAO** (por Burkina Faso, Malio) PO box 7871 - Accra North Tel.: (233) 21 77 48 60
- **FRANCIO** 87, avenue Victor Hugo 75016 Paris Courriel: ambassade@ambassade-benin.org
Site Web: ambassade-benin.org Tel.: (33 1) 45 00 98 82 F ax: (33 1) 45 01 82 02 lundovendrede 9:00-12:30 kaj 13:30-17h:00
- **Niĝerlando** BP 11544 – Niamey Tel.: (227) 72 28 60 / 75 37 10
- **NIGERIO** (diplomatia misio de Ĉado) Bureau 4, Abudu Smith - Victoria Island PO Box - Lagos Tel.: (269) 61 44 11

KONSULEJOJ DE RESPUBLIKO BENINO:

- **RUSLANDO** —Moskvo Espenskij pereulok 7, Tel: (7095)299-2360, (7095)299-2923 (lundovendredo 10-13 kaj 14-17 horoj)
 - **GERMANIO** —Berlin, Englerallee 23, 14195 Berlin, Tel: 00-49-30/236314710 (lundovendredo 9-13)
 - **SVISLANDO** 1201 Genevo, Rue de Lausanne 36, Tel: 00-41-22/906-8460 (lundovendredo 9-13 kaj 15-18 horoj)
 - **HUNGARIO** — 1126 Budapest, Orbanhegyi ut 49, 0036-1/2258220 consulate@benin.hu
 - **AŬSTRIO** AT 1070 Wien, Burggasse 60, Tel. + 43 1 5239300, Faks. + 43 1 5261705 wagner@reiwag.at
 - **FRANCIO** — **Parizo** 89 rue du Cherche Midi 75006 PARIS Tél.: (33 1) 42 22 31 91
 - **Lion** 95 Avenue du Maréchal de Saxe 69003 Tel.: (33 4) 78 71 77 71Fax: (33 4) 78 47 01 03
 - **Marselo** 21 rue Grignan 13006 Marseille Tel.: (33 4) 91 54 05 00 Fax: (33 4) 91 54 11 55, houenous@club-internet.fr
 - **LUKSEMBURGIO** B.P. 65, L-5801 – Hesperange Tel.: (352) 26 18 56 66 F ax (352) 26 18 56 67, www.benin.lu, info@benin.lu
 - **SENEGALO** — **Dakaro** Tel.: (221) 824 87 08 Fax: (221) 824 87 08
- Pliaj informoj en <http://www.ambassade-benin.org/>

Bonvolu informiĝi ankaŭ en <http://destinia.com/guide/he-world/africa/benin/1-30001-30034/3/en>
Invitiloj

Por invitiloj bonvolu turni Vin al Jean Codjo (jean_codjo@yahoo.com)

KONFERENCEJO KAJ TRANOKTEJO:

ŜONGHAI CENTRO

Rue du marché OUANDO,

Quartier OUANDO

Porto-Novo, Benin

Tel.: 229 20225092, Fakso: 229 20222050, www.songhai.org.

BONVOLU NENIAM SKRIBI AL LA KONFERENCEJO, NUR AL ORGANIZANTOJ !

TRANOKTEBLOJ

Por **tranokti** en la sama centro ekzistas jenaj ebloj:

– en 1-lita ĉambro (klimatizilo, duŝejo, necesejo) 282 EUR

– en 1-lita ĉambro (ventumilo, duŝejo, necesejo) 234 EUR

– en 2-lita ĉambro (klimatizilo) duŝejo, necesejo estas en koridoro 210 EUR

– en 2-lita ĉambro (ventumilo) duŝejo, necesejo estas en koridoro 171 EUR

– en 3-lita ĉambro (ventumilo) duŝejo, necesejo estas en koridoro 153 EUR

Prezoj estas por la tuta konferenca periodo, krom la postkonferenca ekskurso – por unu persono – ĉiuj manĝoj inkluzivitaj.

Du personoj povas tranokti en 1-lita ĉambro, ĉar estas larĝa lito dupersona, tamen la prezo ne ŝanĝiĝas.

Nepre bonvolu alporti bantukojn, ĉar la Centro ne havas ilin kaj ne liveras. Lokaj samideanoj informis, ke matracoj kutime estas kovritaj, sed ili mem kutimas alporti litotukojn, do bonvolu prizorgi ankaŭ tion.

Ekskursoj:

Se al iu ekskurso aliĝos malpli ol 10 homoj, la ekskurso povas esti nuligata. Tiukaze Vi povas elekti alian ekskurson aŭ ILEI repagos vian monon.

DT1: ADJARRA (la 2an de aŭgusto, sabate, je la 9:00-18:30a horo, 12,00 EUR)

DT2: AGUEGUES (la 31an de julio, ĵaŭde, je la 15-18:30a horo, 12,00 EUR)

DT3: DANGBO (la 4an de aŭgusto, lunde, je la 9:00-14:30a horo, 12,00 EUR)

DT4: BIMYNS (la 1an de aŭgusto, vendrede, je la 15-18:30a horo, 15,00 EUR)

TT: PIEDE TRA PORTONOVO (la 3an de aŭgusto, dimanĉe, je la 9:00-18:30a horo, kosto — 20,00EUR)

PE: MALKOVRO DE SUDA BENINO dum kvartaga vojaĝo (la 5-8an de aŭgusto, kosto — 290 EUR en 1-lita ĉambro kaj 240 EUR en 2-lita ĉambro)



DT1: ADJARRA (la 2an de aŭgusto, sabate, je la 9:00-18:30a horo, 12,00 EUR) estas metiista vilaĝo kiu situas norde de Portonovo. Per aŭtobuso ni atingos tiun tradician urbon kies loĝantaro estas metiistoj. Ni vizitos la grandan vendejon kaj la ejon de fabrikado de muzikinstrumentoj (tamtamoj, tamburoj, kastanjetoj, diversaj muzikiloj.). Eblas aĉeti memoraĵojn.

DT2: AGUEGUES (la 31an de julio, ĵaŭde, je la 15-18:30a horo, 12,00 EUR) signifas surteraj vilaĝoj kompare al surakvaj loĝantaroj. Estas multnombraj vilaĝoj kiuj kutime iĝas surakvaj dum la pluva periodo. Pere de boato, ni trapasos diversajn vilaĝojn kiuj situas laŭlonge de la lago Oueme kaj de la rivero So. Ni renkontos loĝantojn kiuj profesie estas fiŝkaptistoj kaj malkovros tipajn loĝejojn apud kaj sur akvo.

DT3: DANGBO (la 4an de aŭgusto, lunde, je la 9:00-14:30a horo, 12,00 EUR) okcidente de Portonovo; per aŭtobuso, ni atingos naskiĝurbon de Dekano Adikpe kiu kreis la **afrikan alfabeton**; ni renkontiĝos kun liaj disĉiploj kaj vizitos la naturan kuracejon ankaŭ kreitan de li. Se sufiĉos tempo kaj estos deziro – eblas viziti ankaŭ la urbon, la varman fonton. Estas ankaŭ pliaj vidindaĵoj.

DT4: BIMYNS (la 1an de aŭgusto, vendrede, je la 15-18:30a horo, 15,00 EUR) turisma centro kreita de s-ro Issa BADAROU en la jaro 1995 sude de Portonovo. Ni vizitos la centron kun ĝiaj Radio elsendo „Weke“; diversaj ludejoj kaj la Parko de sovaĝaj bestoj kiel leonoj, krokodiloj k. t. p.; bredado de ĉevaloj, dromaderoj, k. t. p.

TT: PIEDE TRA PORTONOVO (la 3an de aŭgusto, dimanĉe, je la 9:00-18:30a horo, kosto — 20,00EUR) ni vizitos Hogbonou (aŭ Adjathe), kreita de la reĝo Tê Agbanlin dum la deksepa jarcento. La nomo Porto-Novo aperis en la jaro 1752 kun la portugalo Eucharistus Campos laŭ kiu Hogbonou similas al la portugala urbo Porto. Ni marŝos dum tridek minutoj por malkovri la urbon

de Songai ĝis la centro de la urbo kie ni vizitos la etnografian muzeon. Apude situas la sidejo de la nacia asembleo. Ni vizitos la nacian ĝardenon kie troviĝas centjaraj arboj. Piknika tagmanĝo en la ĝardeno. Tagmeze ni renkontriĝos kun la kooperativo de virinoj por la protektado de naturo: pere de forĵetitaj plastikaĵoj ili fabrikas uzeblajn objektojn kiel vestaĵoj, pupoj k. t. p. Ni vizitos la sklavan muzeon „da Silva“ kaj dum la resta tempo la historian muzeon Honme. Ni revenos al Songhai piede aŭ per motor-taksio „Zémidjan“. Tiuj kiuj laciĝos marŝante, aŭ volos esplori motor-taksion, devas esti pretaj aldone pagi ĉirkaŭ 200 fcfa, ĉar origine antaŭvidita ekskurso estas perpieda.

PE: MALKOVRO DE SUDA BENINO dum kvartaga vojaĝo:

1a tago (5/08): Forveturo de Portonovo post la fermo de la Konferenco. Survoje ni vizitos la Reĝan Palacon en la urbo Kétu. Tagmanĝo. Post tarpaso de urbo Kové, ni atingos Abomey — nacian historian ĉefurbon kreitan de HOUEGBADJA en 1a deksepa jarcento. Ni vizitos GOHO kie troviĝas la Statuto de BEHANZIN, la reĝo kiu dum kvar jaroj batalis kontraŭ okupado kaj koloniigo; ni vizitos la historian muzeon en reĝaj palacoj (la muzeo troviĝas en du palacoj apud la dek ceteraj sen kalkuli la 12 aliajn privatajn), kiu ekde la jaro 1985 eniras liston de Unesko de kulturaj heredaĵoj de la mondo. Vespermanĝo kaj tranokto en Abomey.

2a tago (6/08): Matenmanĝo kaj, survoje al Lokossa, ni vizitos Azove, la plej grandan regionan vendejon, kaj Aplahoué, la urbeton de kie Esperanto disvastiĝas en Benino. Post tagmanĝo ni brakumados pitonojn en vodua ejo en la vilaĝo EFOUIHOUE. Posttagmeze ni alvenos al Lokossa, kie vizitos la sidejon de la Afrika Oficejo kaj renkontiĝos kun esperantistoj de Lokossa kaj eventuale en Kodji. Vespermanĝo kaj tranokto en Lokossa.

3a tago: (7/08): Matenmanĝo, renkontiĝoj kun aliaj esperantistoj, poste ni veturos al Bopa apud la lago Aheme. Tagmanĝo kaj partopreno en vodua festo Zangbeto (reĝa dumnokta gardisto), sed ni tie estos tage, ne dumnokte. Bonvolu ne timi! Bone! Ni vidos tiel kiel ĝi sin prezentas tage ĉar novuloj kiuj ĝin renkontis nokte ne plu vivas... En HOUEDA (blankuloj prononcis Ouidah) ni vizitos la muzeon pri la Sklava komerco en Dahomey (nomo de la lando ĝis la 30a de novembro 1975) — Benino. Per la sama vojo kiel la sklavo, ni atingos la marbordon kie troviĝas nia hotelo. Vespermanĝo kaj tranokto apud la maro. En la maro naĝi ne eblas, sed en la hotelo troviĝas baseno, kiu enhavas maran akvon.

4a tago (8/08): Matenmanĝo. Tra la malmodernaj vilaĝoj de fiŝkaptistoj ni veturos tridek km ĝis Vidjrosse kaj al Abomey-Calavi, de kie ni boate atingos Ganvie: Afrika Venecio, tute surlaga vilaĝo kun 30 000 loĝantoj. Tagmanĝo en Ganvie. Post vizito al surlaga bazaro, loĝejoj k. t. p., ni veturos al Cotonou ĉirkaŭ la 17a horo aŭ revenos al Portonovo ĉirkaŭ la 18a horo. Tiuj, kiuj forflugas hejmen en tiu ĉi tago, estos veturigitaj ĝis la flughaveno, kaj tiuj, kiuj restas — ĝis la hotelo.



ILEI-konferenco en Afriko estos grava evento por Esperanto-movado entute, por historio de ILEI kaj por E-movado en Afriko. Partoprenu la konferencon por kuraĝigi la samideanojn en Afriko kaj omaĝi iliajn klopodojn por disvastigado de Esperanto en la tuta mondo. Se Vi ne povas veni persone kaj ĉeesti la konferencon fizike — ni ege petas Vin *subteni* la konferencon per financa helpo kaj subvencii partoprenon de kiom eble pli da instruistoj kaj instrukapabligadon de junaj instruemuloj el Afriko per enpagoj al la konto de ILEI ĉe UEA (ilek-a) aŭ al Afrika Fondaĵo de UEA, ĉiam kun indiko „Benino 2008“.

Sed pli bone pleniĝi **aliĝilon** en <http://ilei.info/konferenco/alighilo2008.php> kaj partopreni en la unua en historio granda internacia porinstruista E-aranĝo en Afriko. Se vi havas demandojn, proponojn aŭ komentojn — Vi ĉiam estas bonvena **skribi** al: **Aida Ĉiĝikaité** (aidute@mail.lt), ILEI-estrarano pri konferencoj) kaj **Charles Alofa** (alofkarlo@yahoo.fr, prezidanto de LKK).

La kotizoj varias depende de la loĝlando kaj aliĝtempo de la aliĝanto:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B kaj C.

B: Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.) kaj Latinameriko.

C: ĉiuj landoj de Afriko

Kotizoj (en EUR) ĝis 31.03.08 ĝis 30.06.08 ekde 01.07.08

Aliĝkategorio A / B / C A / B / C A / B / C

1. Membro de ILEI 50 / 30 / 5 60 / 36 / 5 70 / 42 / 10

2. Ne ILEI-ano 55 / 35 / 5 68 / 44 / 5 80 / 52 / 10

3. Junulo, handikapulo 25 / 15 / 5 30 / 18 / 5 35 / 21 / 10

Aliĝkotizo por 1 tago: 25 EUR por A kaj B landoj, 5 EUR por C landoj.

La kotizo ne inkluzivas restadon, ekskursojn, aparte pagendajn aferojn, ajnan asekuron.

Konferencaneco estas transdonebla, sed necesas alpagi diferencon depende de lando kaj aliĝperiodo. ILEI diferencon ne repagas.

Por mendoj atingantaj nin post la 1-a de majo 2008 oni devas aldone pagi 10% de sumo por mendataj servoj.

Post la 1-a de junio ni ne garantias al Vi mendon de tranoktado.

Pagebloj:

[] al ILEI-konto ĉe UEA ilek-a, indikante: "ILEI-Konferenco", nur se vi pagas ĝis la 15-a de majo 2008;

[] al la bankokonto de ILEI en Svedio: IBAN: SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6,00 EUR por svedaj bankokostoj se vi pagas de ekster Eŭropa Unio. El Svedio eblas pagi al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Forenings-sparbanken.

La aliĝo validas nur post kiam la Kasisto ricevis vian pagon. Kiel aliĝdato validas la dato en kiu via pago atingis la konton de ILEI.

La prezoj por restado estas iom rondigitaj por plifaciligi la partoprenon de niaj afrikaj samideanoj.

B O N V E N O N !